

# Eŭropa Bulteno

Sendependa esperantlingva ret-bulteno  
por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

---

Decembro 1999. N-ro 1

---

## SINPREZENTO

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri Eŭropa Esperanto-Unio (<EEU-informilo>) kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (<Eŭropa debato>). Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso <u.broccatelli@tiscalinet.it>; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

## EEU - INFORMILO

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estas kupola organizaĵo de la esperantistaj Landaj Asocioj de la landoj, kiuj estas membroj de Eŭropa Unio. Ĝia statuto estis aprobita dum la tria Eŭrop-Unia Kongreso en Stutgarto en 1997. Ĝi tekstas jene.

## STATUTO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO

### Artikolo 1

Nomo kaj celoj

1. La nomo estas Eŭropa Esperanto-Unio, mallongigite EEU.
2. EEU celas la kunordigon de la esperantista agado rilate al la instancoj kaj politiko de la Eŭropa Unio.

### Artikolo 2

Membreco

1. Membroj de EEU estas la landaj Esperanto-asocioj de la membro-ŝtatoj de EU, kiuj subskribis tiun ĉi statuton.
2. Ĉiu Esperanto-asocio en membroŝtato de la Konsilio de Eŭropo rajtas peti

statuson kiel observanto. Pri la aljuĝo de statuso de observanto decidas la Komitato.

### Artikolo 3

Kotizo

Ĉiu membro de EEU kaj ĉiu observanto pagas jaran kotizon laŭ la nombro de ordinaraj membroj de ĝi. La kotizon fiksas la Komitato.

### Artikolo 4

Organoj de EEU

La organoj de EEU estas la Komitato, la Trojko kaj la Prezidanto.

### Artikolo 5

La Komitato

1. La Komitato estas la gvida organo de EEU kaj konsistas el po unu reprezentanto de ĉiu membro kaj observanto de EEU. La Komitato kunsidas minimume ĉiun trian jaron, prefere dum la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso.

2. La reprezentanto estu nomumita de la estraro de la membro-organizo aŭ observanto por tri jaroj kaj skribe anoncita al la Prezidanto de EEU. Membro aŭ observanto, kiu ne pagis kotizon en la pasinta jaro, ne havas voĉdonrajton. La organizoj povas anonci anstataŭanton.

3. a) la Komitato decidas pri

- la statuto de EEU,
- la ĝeneralaj agad-linioj,
- la kotizoj,
- la kongreso,
- la aljuĝo de statuso de observanto kaj
- la kunlaboro kun kaj financa subteno de laborgrupoj pri specialaj temoj ligitaj al la celoj de EEU.

Kunlaborantaj laborgrupoj havas statuson de observantoj.

b) La Komitato elektas inter si Trojkon por tri jaroj.

4. La membroj havas po unu voĉon.

5. Observantoj rajtas ĉeesti kunsidojn de la EEU-komitato kaj havas parolrajton. Ili ne havas voĉdonrajton.

### Artikolo 6

La Trojko

1. La Trojko estas la plenuma kaj reprezenta organo de EEU inter la kunvenoj de la Komitato kaj konsistas el tri personoj.

2. a) La Trojko

- agas laŭ la ĝeneralaj agadlinioj deciditaj de la Komitato,
- decidas pri la sekretario,
- decidas pri la buĝeto de EEU kaj
- tenas la kontaktojn al kunlaborantaj laborgrupoj kaj observantoj.

b) La Trojko elektas inter si Prezidanton kaj kasiston kaj disdividas inter si la labortaskojn.

### Artikolo 7

La Prezidanto

1. La Prezidanto estas la plej alta reprezentanto de EEU al ekstero.

2. La Prezidanto

- gvidas la kunsidojn de la Trojko kaj la Komitato.
- kunordigas la agadon,
- reprezentas la organizon en- kaj ekster-movade kaj
- zorgas pri la jarraporto enhavanta finanĉan raporton.

### Artikolo 8

Statut-ŝanĝoj

Proponoj pri ŝanĝoj de tiu ĉi statuto estas skribe anoncigitaj al la Prezidanto minimume du monatojn antaŭ Komitat-kunsido.

Propono estas akceptita, se du trionoj de la ĉeestantaj komitatanoj, reprezentantaj minimume duonon de la membroj, aprobas ĝin.

### Artikolo 9

Diversaĵoj

Pri aferoj ne regulitaj en ĉi tiu statuto decidas la Trojko, responsante al la sekvonta komitatkunsido.

Stuttgart, la 18an de majo 1997 Subskribis:

Aŭstrio:	Katinjo Fettes-Tosegi
Belgio:	Flory Witdoekt
Britio:	Geoffrey Greatrex
Danlando:	Kim J. Henriksen
Francio:	Claude Nourmont
Germanio:	Frank Stocker
Hispanio:	Luis Hernandez
Irlando:	Sean O'Riain
Italio:	Umberto Broccatelli
Luksemburgio:	Brian Moon
Nederlando:	Hans ten Hagen

=====

## Eŭropa Esperanto-Unio kunvenis en Berlino

EEU estas kunordiga organizo de la Landaj Esperanto-Asocioj de la landoj de Eŭropa Unio, cele al agado ĉe la EU-instancoj. Kiel decidite dum la pasintjara UK en Montpeliero, provizora komitato, formita el Katinjo Fettes-Tosegi (Aŭstrio) kaj Umberto Broccatelli (Italio), pretigis la kunvenojn de EEU dum la Berlina UK. Dum du ne publikaj kunvenoj la reprezentantoj de la diversaj esperantistaj landaj asocioj de Eŭropa Unio priparolis la situacion de EEU, elektis la novan trihoman estraron kaj difinis la gvidliniojn por la venonta agado. Jaŭdon la 5an de aŭgusto 1999 okazis la publika kunveno de EEU, kiun ĉeestis ĉ. 60 personoj, kiuj vigle debatis. La ĵus elektita nova trihoma estraro ("Trojko") prezentis sin: Umberto Broccatelli (Italio), prezidanto, Katinjo Fettes-Tosegi (Aŭstrio), sekretariino, kaj Hans Ten Hagen (Nederlando), kasisto. Ĉeestis reprezentantoj de 12 landaj asocioj, kiuj aliĝis al EEU; parto el tiuj asocioj jam pagis siajn aliĝkotizojn aliaj tion faris dum la kongreso mem aŭ promesis fari baldaŭ. Unu asocio, la greka, ne povis sendi reprezentanton,

sed esprimis letere sian aliĝon. Du asocioj, la brita kaj la dana, tute ne ĉeestis. Hans Erasmus raportis pri la laboro de la t.n. Brusela Laborgrupo ("Laborgrupo pri la Lingvoproblemo en Eŭropo"), kiu agas sendepende sed kunlabore kun EEU, kaj pri la projektoj Neighbour kaj Relais. Oni substrekis la neceson de aktiva apogo, kaj labora kaj financa, fare de la Landaj Asocioj, kaj ankaŭ la eblon kaj dezirindecon ke Landaj Asocioj eŭropaj ekster EU aliĝu kiel "observantoj". Estis anoncita konstanta informado pri EEU pere de la bultenoj de la landaj asocioj, per interreto kaj per informfolioj rckte sendotaj al "subtenantoj". Broccatelli asertis, ke la sola vera ŝanco por Esperanto estas evoluo de EU al vera Federacio (multnacia demokrata ŝtato). Ties internan problemon de lingva komunikado povos solvi Esperanto, se la esperantistoj kapablos aŭdigi sian voĉon. (Vidu la prelegon kaj sekvajn opini-interŝanĝojn sub <Eŭropa Debato>).

## AGADOJ FARITAJ EN LA DIVERSAJ LANDOJ DE EU

laŭ raportoj ricevataj

FRANCIO - Oni sendis retmesaĝojn kaj leterojn al la francaj eŭrodeputitoj (escepte de tiuj de la Nacia Fronto pro etikaj kialoj). Jen listo de apogantoj: Sylviane AINARDI (PCF - GUE/GVL) reasertis sian apogon kaj deziras kunlabori Yasmine BOUDJENAH (PCF - GUE/GVL) apogas kaj deziras sekvi la aferon. Gérard CAUDRON (PS - PSE) reasertas sian apogon kaj deziras kunlabori. Danièle DARRAS (PS - PSE) reasertas sian apogon. Harlem DESIR (PS - PSE) apogas kaj promesis sendi favoran leteron. Geneviève FRAISSE (Sendependa - GUE/GVL) apogas kaj petas informojn. Gérard ONESTA (Verts - ALE) apogas kaj deziras kunlabori. Yves PIETRASANTA (Verts - ALE) apogas kaj deziras sekvi nian aferon. Bernard POIGNANT (PS - PSE) milde apogas kaj partoprenos pri minoritataj lingvoj.

Entute 9 el 87 Francaj eŭropaj deputitoj (10,34%)

ITALIO - Esprimis sin favore al Esperanto:  
Armando COSSUTTA (GUE/NGL, Prezidanto de la Partio de la Italaj Komunistoj)  
Gianfranco DELL'ALBA (NI, listo Bonino),  
Olivier DUPUIS (NI, listo Bonino),  
Fiorella GHILARDOTTI (PSE, Demokratoj de maldekstro)

Aliaj kontaktoj estis prenitaj de Hans Erasmus pri la agado de la Laborgrupo por la Lingva Problemo en Eŭropa Unio.

=====

## EŬROPA DEBATO

Esperanto kaj Eŭropa Unuiĝo: ŝancoj kaj defioj.

Kunveno EEU-3

Berlino - Jaŭdon la 5an de aŭgusto 1999 - Hodler - h. 9.00

La celo de tiu ĉi kunveno estas libere interŝanĝi inter ni ideojn kaj opiniojn pri la perspektivoj de Esperanto en rilato kun la okazanta procezo de Eŭropa Unuiĝado, por eltiri, se eble, sugestojn por nia agado.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi legis verketon, kiu profunde impresis min. Temas pri eseo titolita Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?, verkita de konata

interlingvisto, konanto kaj parolanto de Esperanto kaj ankaŭ de Ido kaj de Interlingua, profesie psiĥiatrio, nome d-ro Tazio Carlevaro, el Bellinzona en la svisa kantono Tiĉinio. La titolo de tiu kajero estas reprenita el tiu de la eseo Ĉu Sovetunio postvivos la jaron 1994? verkita de rusa ekzilito, eseo kiu ĉe sia apero ŝajnis bizara, sed poste montriĝis profeteca.

Carlevaro asertas ke la angla lingvo estas jam definitive venkinta en la rolo de tutmonda komunika lingvo kaj ke Esperanto jam ne havas plu ŝancojn, kaj ke la kaŭzo de tio estas la fakto, ke historion movas ne idealoj sed interesoj, profitceloj.

En posta mesaĝo al mi, Carlevaro klarigas ke li ja bone vidas ke konsekvenco de la venko de la angla lingvo estos la iom-post-ioma malkresko kaj fine malapero de la ceteraj naciaj lingvoj, sed li aldonas, ke tia perspektivo ne estigos senteban kontraŭstaron, ĉar la procezo okazos malrapide, paŝon-post-paŝo, tiel ke la plej multaj homoj preskaŭ ne perceptos ĝin aŭ finfine ne donos al si zorgojn pri tio, ĉar la individua intereso estas enmeti sin en la fluon de la tutmonda lingvo, por ĝui personan avantaĝon.

Ĉu ni devas do forlasi niajn esperojn, nian batalon?

La diagnozo kaj la prognozo de Carlevaro estas, ĉe la nunaj kondiĉoj, nerefuteblaj. La Esperanto-movado tute ne havas la forton renversi la fluadon de la historio. La angla lingvo havas malantaŭ si la forton ekonomian, politikan, kulturalan, de Usono. Esperanto havas malantaŭ si nenion. Ĉe la nunaj kondiĉoj, mi diris; sed la historiaj kondiĉoj povus ŝanĝiĝi.

La forto de la angla lingvo venas, kiel dirite, de la fakto, ke ĝi estas la lingvo de Usono, granda monda potenco politika, ekonomia kaj militista. Se en la mondo ekzistus granda ŝtato multnacia kaj demokrata havanta internan lingvoproblemon kaj havanta samtempe fierecon pri si mem kaj strebon al politika kaj ankaŭ kultura sendependeco en la monda teatro, tiam Esperanto, aŭ ĉiuokaze neŭtrala planlingvo, havus ian ŝancon.

Nu, ekzistas fortaj ŝancoj ke tia ŝtato naskiĝos en ne fora tempo. En la Eŭropa kontinento, post du sangaj militoj, veraj intercivitanaj militoj inter homoj apartenantaj al la sama civilizo, antaŭ kvindek jaroj oni komencis konstrui komunan domon. Dum la dua mondmilito, kiam la armeoj de la nazi-faŝismaj ŝtatoj okupadis preskaŭ la tutan kontinenton, kelkaj klarvidaj homoj, jam komprenis ke la kaŭzo de la militoj estas la ekzisto mem de plene suverenaj naciaj ŝtatoj kaj ke daŭra paco en Eŭropo povos veni nur de la starigo de Eŭropa demokrata federacio; de la unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo. La vojo estis pli malfacila ol tiuj homoj supozis: la rezistoj de la naciaj ŝtatoj, kun iliaj strukturoj, kun iliaj centjaraj tradicioj, kun iliaj mitoj, estis fortaj.

Oni ne kuraĝis komenci de la bazo: nome de komuna politika konstitucio. Oni preferis iri laŭ unuopaj sektoroj, kun paŝoj antaŭen kaj malantaŭen. Sed nun oni atingis la stadion de komuna monunujo. Kaj de tiu stadio retroirado estus pli malfacila kaj tre multekosta.

Tamen oni ne povas halti. Komuna mono bezonas komunan regadon de la ekonomio.

La okazintaĵoj en la eksa Jugoslavio kaj la milito pri Kosovo, montris la malfortecon de la Eŭropa Unio. Prave iu diris ke Eŭropa Unio estas ekonomia giganto, politika nano kaj milit-afera vermo. Nun oni rekomencas serioze paroli pri Eŭropa komuna Armeo, nepra kondiĉo por ke EU havu politikan sendependecon.

En itala taggazeto de la 25a de julio, sub la titolo "Unusola armeo por Eŭropo - La germanaj planoj pri armea integriĝo", la ĵurnalisto diras interalie "belaj promesoj, sed la unuaj paŝoj estos malfacilaj: same kiel en Bruselo oni disputos ankaŭ pri la komuna lingvo".

La povo eldoni monon kaj la povo havi armojn estas la ĉefaj distingiloj de ŝtato. Kiam tiuj povoj estos plene transirintaj de la naciaj ŝtatoj al la Eŭropa Unio, tiam la Unio estos fariĝinta ŝtato, nome federacio.

Ju pli oni alproksimiĝos al tia definitiva transiro, des pli la lingva problemo en la Unio perceptiĝos kaj pligraviĝos.

Kiam Eŭropa Unio estos atinginta la karakterizojn de federacio, la problemo pri komuna komunika lingvo akutiĝos. Kaj tiam, se oni volos solvi tiun problemon, du estos la eblecoj: aŭ nacia lingvo, nome la angla, aŭ planlingvo, do praktike Esperanto. Se oni ne kuraĝos fari eksplicitan elekton, tio signifos fakte elekti la anglan. Sed la argumentoj de esperantistoj estos tiam tre pli fortaj kaj ekzistos ia ŝanco por Esperanto.

Ŝanco ja malgranda, sed reala. En kontraŭa kazo, nome se Eŭropa Federacio ne naskiĝos, la ŝancoj de Esperanto estos nulaj.

Tial ĉiu esperantisto, eĉ ne eŭropa, devus favori la naskiĝon de Eŭropa Federacio. Kaj ne nur pro tio. Ankaŭ tial ke strebo al Eŭropa Federacio, unua kazo de kontinenta demokrate konstruita multnacia federacio, estos ekzemplo por aliaj mondareoj, kaj gravega ŝtupo por konstruado de tutmonda registaro. Tio signifas ke strebo al Eŭropa Federacio koincidas kun strebo al paco.

Ankaŭ Eŭropanoj vivantaj en landoj ekonomie prosperaj kaj bone regataj ne devus timi partopreni en la konstruado de komuna granda patrolando eŭropa: oni devas forlasi miopajn egoismajn starpunktojn kaj kontribui al komuna paco kaj komuna prospero, ĉar komuna estas la destino de la eŭropaj popoloj.

Tio aparte validas por esperantistoj, pro la diritaj kialoj: tio estas la sola ŝanco, kiun Esperanto havas.

Tial la agado de la esperanto-movado en la landoj de Eŭropa Unio estas ege grava.

Esperantistoj devas ĉeesti en la eŭropaj movadoj, agi sur la eŭropaj institucioj, prezenti siajn proponojn en kunordigita, serioza maniero.

La ŝancoj estas malmultaj. Vetu por Esperanto kontraŭ la angla estas riska veto. Sed estas nia devo insisti pri la terura kultura katastrofo, kiun la fina venko de la angla lingvo estigus en la daŭro de kelkaj generacioj: la malapero de niaj naciaj kulturaj lingvoj.

Nia batalo por demokrata solvo de la lingvo problemo estas malfacila, sed, laŭ fama esprimo de Antonio Gramsci, oni devas kunigi al la pesimismo de la racio la optimismon de la volo.

Kaj ni memoru tion, kion diris Max Weber: "Tio, kio eblas, ne efektiviĝos, se ne ekzistus homoj, kiuj ĉiam denove reproponadas tion, kio ne eblas".

\* \* \*

La prelego vekis inter la ĉeestantoj rimarkindan intereson, kiu manifestiĝis en esprimoj de konsento kaj ankaŭ de malkonsento.

Jen la punktoj pri kiuj aperis malkonsentoj, kune kun la respondoj poste donitaj de la preleganto.

La finna reprezentantino diris ke ŝi, same kiel multaj anoj de ŝia asocio, ne subtenas starigon de Eŭropa Federacio, kaj ŝi opinias ke Esperanto havas ŝancojn ankaŭ sen ĝi, ekzemple danke al la ideoj esprimitaj en la Manifesto de Prago.

U. Br. respondis: ĉiu estas libera havi sian opinion, sed mi ne estas tiel optimisma kiel vi, kaj mi opinias ke sen Eŭropa federacia Unuiĝo Esperanto ne havas ŝancojn.

Pola kongresano asertis: a) en la prelego estas kontraŭdiroj, ĉar ĝuste la ekzemploj de la hispana civila milito kaj de la militoj en eksa Jugoslavio montras ke ankaŭ interne de ŝtato povas okazi militoj; b) cetero Eŭropo havis 50 jarojn da paco post la dua mondmilito, kvankam ĝi ne estis federacie unuigita; c) krome federacia unuiĝo malhelpus la aliĝon de aliaj landoj al la Unio.

U. Br. respondis:

a) la militoj en Hispanio kaj en Jugoslavio ĝuste okazis kiam la respektivaj ŝtatoj disfalis, pro militista ribelo en la unua kazo, pro manko de vera demokratio kaj de vere federacia sistemo en la dua. Federacio estas garantio de paco kondiĉe ke ĝi estu ja vera federacio, nome demokratia kaj libere akceptita de la konsistigantaj federacieroj.

b) Paco povas esti gardata en areo formita el suverenaj ŝtatoj per du vojoj:

Unu estas la imperia, kie unu ŝtato pli forta ol la ceteraj superregas kaj trudas sian ordon, kaj la ceteraj ŝtatoj vole-nevole akceptas ĝin. Tio estis la situacio de Eŭropo post 1945: ĝi estis dividita je du kontraŭaj tendaroj, sub du diversaj imperioj. La disfalo de la soveta imperio tuj elĉenigis militojn. Sovetunio mem ne estis vera federacio kaj dividiĝis.

La dua vojo estas la federacia sistemo, nome libervola demokrata unuiĝo. En la okcidenta parto de Eŭropo ĝuste la unuiĝa procezo kaj la perspektivo al pli strikta unueco ĝis nun malhelpis renaskiĝon de naciismoj.

c) Nun la problemoj naskitaj de aliĝo de novaj landoj al EU devas ricevi solvojn per komunaj decidoj de 15 registaroj. Nur komuna registaro, kun tuteŭropa perspektivo, respondeca al la tuta Eŭropa popolo, ne al la unuopaj naciaj elektantaroj, povas trovi la oportunajn solvojn, ekzemple decidante pri sufiĉe granda komuna buĝeto por agrikulturo kaj por helpo al la malpli riĉaj regionoj. La ekzemplo pri tio estas la reunuiĝo de Germanio, kiu eblis ĉar la Federacia Registaro povis mastri la procezon kaj la civitanoj de la okcidentaj pli riĉaj federaciaj landoj helpis kaj helpas la integriĝon de la orientaj.

\*\*\*

La debato daŭris poste per reto.  
Vincent CHARLOT jene mesaĝis:

<En la malfermita kunsido pri eŭropa agado, mi ĉeestis unuan parton, dum kiu ni aŭdis nur la gvidantaron, kiu tre longe parolis (ĉefe Broccatelli kaj Erasmus). Restis apenaŭ kvin minutoj por debati kaj en tiuj kondiĉoj, oni ne povis diskuti. En la dua parto de la kunsido, ni aŭdis prelegon de Umberto

Broccatelli, kiu klarigis, ke laŭ li, ĉiuj Esperantistoj devus apogi la federistojn kaj federigontan Eŭropon. Debato okazis poste, en kiu pluraj intervenis rapide. Ritamäki kaj mi kontraŭis tiun sintenon. Mi klarigis, ke nur plurisma agado al ĉiuj demokratiaj partioj povos sukcesi. La tempo estis rapide forfluginta!

La afero estas nur bedaŭrinda, sed ŝajnas al mi, ke problemo estiĝas aŭ riskas estiĝi pri Eŭropa agado inter la broccatelli-erasmus-a kaj franca konceptoj.

Laŭ Erasmus-Broccatelli, ni devus agadi "unutendence" (federistoj), al la Brusela Komisiono, silente kaj per notoj, enŝovigante Esperanton sen tion diri. Laŭ franca koncepto, ni devus agadi "plurisme" (ĉiuj demokratiaj fortoj), al la Parlamento laŭte informante la E-Movadon kaj niajn partnerojn neesperantistajn, per rezolucioj kaj petante debatojn pri Esperanto.

Kompreneble, ambaŭ konceptoj povus interplektiĝi kaj kompletiĝi reciproke. Sed en la Berlina UK, ni ne povis debati pri tio!>

Jen respondo de Broccatelli:

<Fakte en Berlino la tempo ne sufiĉis por detale debati ĉion, kaj tial ke la temoj estas ampleksaj kaj detale klarigendaj, kaj ankaŭ tial ke parto de la antaŭvidita tempo estis fortranĉita. Fakte mi antaŭvidis unu fermitan kunsidon kaj DU publikajn kunsidojn, ĝuste por povi sufiĉe detale trakti la temojn. Mia intenco estis trakti en la unua kunsido, ne publika, la organizan situacion de EEU kaj fari la elekton de nova plenumkomitato ("Trojko"). En la dua kunsido, publika, oni devintus trakti la faritan kaj farotan agadon de EEU; en ĝi estis antaŭvidita raporto de Hans Erasmus pri la Brusela Laborgrupo. La tria kunsido (do la dua publika) estis antaŭvidita por libera ĝenerala debato "politika", nome pri la ideoj kiuj devus subteni nian agadon; en ĝi estis enkadrigita mia prelego, kiel kontribuo al libera forumo. En la kongresa libro tamen oni erare skribis: du fermitaj kunsidoj kaj unu publika; tion oni povintus ŝanĝi per anonco en la kongresa kuriero, sed okazis ke la unua kunsido (nepublika) devis halti je duona tempo, ĉar parto de la kunsidantoj (eĉ la protokolantino) devis foriri al kunsido de UEA-komitato. Sekve oni ne povis elekti la novan triopon. Do oni decidis ke la dua kunsido ne estos publika sed restos plu fermita, por povi aranĝi la elekton de la nova triopo ktp. Tial en la ununura publika kunveno amasiĝis tro da temoj kaj tio bedaŭrinde iom sufokis la debaton. Sed mi certigas vin, ke tio tute ne estis intenco.

Pri tio, kion mi diris en mia prelego, mi volas klarigi mian starpunkton, kiu estas mia persona.

1) Mi ja estas konvinkita ke la sola vera ŝanco por Esperanto estas naskiĝo de federacia eŭropo (pro la motivoj, kiujn ankaŭ Chiti-Batelli plurloke prezentis) kaj ke tial esperantistoj devus havi sintenon favoran al tiu procezo.

2) Oni rajtas esti skeptikaj pri la realigebleco de eŭropa federacio; tio tamen ne signifas ke oni estu principe kontraŭaj. Same, multaj homoj opinias ke la celo de la esperantistoj estas neatingebla, kvankam teorie dezirinda.

3) Federismo ne estas "partio": oni povas esti federistoj apartenante al ĉiuj demokratiaj partioj, escepte de la ekstreme naciismaj. Ankaŭ iaj pseŭdo-maldekstruloj estas kontraŭ Eŭropo. Bedaŭrinde ili neniam meditis pri la instruo de Altiero Spinelli, ke "La vera distingolinio inter progresemaj kaj reakciemaj fortoj estas la distingo inter tiuj, kiuj volas starigon de Eŭropa Federacio, kaj tiuj, kiuj volas la plukonservadon de la nunaj suverenaj naciaj



ŝtatoj" (Vortoj skribitaj de eks-komunisto en faŝisma interna ekzilejo - post karcerio - dum la dua mondmilito!).

4) Ĉiuokaze, tio, kion miaopinio devus fari la esperanto-movado, ne nepre estas aktive lukti politike por la Eŭropa Federacio (ĉar ĝi cetere ne kapablas fari tion!), sed almenaŭ havi al ĝi favoran sintenon, ĉar ĝi estas aspekto de lukto por la paco (la plej konkreta aspekto!), laŭ la instruo de Immanuel Kant, kaj strebo al paco ĉiam estis parto de la esperantisma idearo.

5) Eĉ la homoj vivantaj en landoj, kiuj eble komence ne aliĝus al Eŭropa Federacio (kiel verŝajne britoj, danoj aŭ finnoj), ne devus kontraŭi ties starigon fare de la ceteraj landoj; verŝajne en posta tempo ankaŭ iliaj landoj aliĝos.

6) Homoj, kiuj timas aŭ malŝatas la usonan imperiismon kaj la nunan rolon de Usono kiel "mastro" kaj "policisto de la mondo", devus apogi la naskiĝon de Eŭropa Federacio, kiu estus granda demokrata mondpotenco povanta estigi kontraŭpezon politikan al Usono kaj kungvidi UN-on.

7) Sendepende de ĉio ĉi supre dirita, certe la agado de EEU ne devas esti unudirekta. Oni agu ĉe la eŭrop-uniaj instancoj, ĉe la EP-anoj kaj ankaŭ ĉe la naciaj parlamentanoj, por atingi de konkretaj objektivoj.

8) Kio gravas, estas ke ni interkonsentu pri la ĉefaj plej urgaj objektivoj nun alstrebendaj. Nunmomente la solaj efektivaj agadplanoj, je eŭropunia nivelo, estas la projektoj Neighbour kaj Relais. Oni povas eĉ dubi ĉu ili estas perfektaj, ĉu tio estas la plej bona vojo, sed ni memoru italan proverbon kiu diras "La plibono estas malamiko de la bono", nome ke por atingi ion kion oni taksas pli bona, oni riskas eĉ ne atingi ion bonan, eble malpli bonan, sed reale atingeblan.

9) Apud tio oni rajtas kaj devas fari ĉion, kion oni povas, ankaŭ en aliaj manieroj, kun la celo atentigi la naciajn kaj la uniajn instancojn, la ĵurnalistojn, la klerulojn kaj la publikan opinion pri la eŭropa lingvoproblemo kaj pri la eblecoj proponitaj de esperanto. ... Laŭ MIA agadmaniero Esperanto ne estas tiom prisilentata. Vidu la leteron kiun mi sendis al la italaj EP-anoj, jam diskonigitan al la EEU-komitatoj. ... Diversaj agadmanieroj ne nepre ekskludas unu la alian. Ili povas kompletigi sin reciproke.>

\*\*\*\*\*

<<Esperi pri daŭrado de harmonio  
inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj,  
tio estus neglekti la unuforman iradon  
de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri  
la sperton akumulitan de la tempo>>

Hamilton, The Federalist